

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> *** retadreso: satesperanto@free.fr

2005



Decembro 2004 75-a jaro, n-ro 12 (1194)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



**Pacan kaj sukcesan Novan Jaron 2005
deziras al vi el norda hemisfero**

la Redakcio

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...

Karaj,
en viaj manoj estas la lasta ĉijara numero de Sennaciulo. Ĝi estas denove tre varia kun pluraj diversaj rubrikoj kaj temoj. Tiun ĉi jaron ni finas per novaspekta gazeto kaj ni komencu la novan 2005 per renovigo kaj revigligo de nia SAT. Ne forgesu voĉdoni (referendumilo estis kun novembra numero). Aliĝu tuj al la kongreso kaj poste vi pagos loĝadon kaj la reston. Ankaŭ bonvolu mendi belajn kongresajn glumarkojn por reklami nian kongreson en Zagrebo. Fine, mi deziras al vi ĉiuj tre agrablajn jarfinajn festojn kaj multe da sano kaj elano por agadi favore al laborista E-movado kaj SAT dum la jaro 2005 kaj sekvaj.



Via Redaktoro.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSRFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par: EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.



Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


MONATO DE LA ESPERANTO-LIBRO



Okaze de jarfinaj festoj plezurigu viajn familianojn kaj geamikojn donacante E-librojn.

Liston de SAT eldonaĵoj vi povas trovi en la reto ĉe la adreso:

<http://satesperanto.free.fr/eldonajhoj/index.html>





POR

JUNAJ

KAJ

AĜAJ

INFANOJ



Vi povas mendi librojn ĉe la SAT-sidejo aŭ ĉe via LEA-libroservo. Tiel vi helpas viajn Asociojn kaj disvastigas sennaciecan kulturon.



ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

La Traktato por starigi Konstitucion por Eŭropo

– de Ken KEABLE (ken kijbul).

Jam estas tempo por diskuti la proponitan konstitucion por la Eŭropa Unio. La danĝero urĝas, ne nur por la civitanoj de la Unio, sed por la tuta mondo, ĉar temas pri starigo de nova, granda, potenca, maldemokratia kapitalisma kaj imperiisma ŝtato en Eŭropo.

Notu bone la oficialan titolon de la traktato: “Traktato por Starigi Konstitucion por Eŭropo”. Laŭ mia sperto (pri Irlando kaj Britio), la subtenantoj de la traktato zorge evitas uzi la ĝustan titolon. Kial? Ĉar kiam la Unio akirus konstitucion, (kiun ĝi ankoraŭ ne havas), ĝi fariĝos ŝtato en formiĝo. Tiam la membrolandoj jure fariĝos 25 provincoj de la nova ŝtato. Oni deziras kaŝi tiun fakton.

Mi protestas kontraŭ uzo de la vorto “Eŭropo” anstataŭ “Eŭropa Unio”, ĉar multaj landoj en Eŭropo ne estas membroj de la Unio – ekzemple Norvegio, Svislando, Belorusio, Ukrainio, kelkaj balkanaj landoj kaj granda parto de Rusio. La celo de tiu misuzo estas ŝajnigi la opojn de la “eŭropa projekto” esti “kontraŭeŭropaj”. Mi estas eŭropano, kiu kontraŭstaras integriĝon de landoj sub unu maldemokratian superan ŝtaton. Sed kiel eŭropano, mi ne povas esti “kontraŭeŭropa”.

La proponita Konstitucio ne estas nur rediro de la volo resti en la sama eŭropa komunumo, al kiu oni jam aniĝis. La Unio neniam antaŭe posedis konstitucion. La Konstitucio starigus eŭropan ŝtategon kiu havus ununuran eksterlandan politikon, armeon, plej altan kortumon; kiu havus konstitucion, superanta ĉiun landan konstitucion, kaj leĝaron, superanta ĉiujn landajn leĝojn. Ĝi abolus la rotaciantan prezidantadon kaj starigus 5-jaran prezidenton, ne elektitan voĉdone de la popolo, sed elektitan de la Konsilio

de Ministroj.

La Konstitucio abolus la rajton de nacioj pri memdispono. Anstataŭ elekti voĉdone niajn regantojn, ni, la civitanoj (aŭ regatoj) de la Unio, pli kaj pli elektadas tiujn, kiuj intertraktas kun niaj regatoj.

La proponita Konstitucio estas la plej lasta kaj plej decida paŝo en la 50-jara procezo de


Ministroj. Tio konsistas el 25 personoj, kiuj donas leĝojn al 450 milionoj da homoj. Ĝi kunvenas malpublike, sen televida vidpovo, sen ĵurnalista spektejo, sen spektejo por vizitantaj civitanoj, sen publike havebla protokolo. La ministroj de la malplipotencaj landoj timas oponi la proponojn de Germanio, Francio aŭ Britio, ĉar ili bezonos subtenon de la plejpotencaj landoj kiam ili etendos la manon almoze. Antaŭ ĉiu kunveno de la Konsilio, la reprezentantoj de Germanio kaj Francio kunvenas por decidi sian komunan politikon. Tiel ili kutime regas la tuton. Britio ĉefe rolas kiel marioneto por Usono.

En la Konsilio, la ministroj konspiras kontraŭ siaj popoloj. Reveninte al sia landa parlamento, ĉiu membro-ministro diras, ke la nova leĝo estas leĝo kaj ne povas esti ŝanĝita.

Brita ĉefministro Tony Blair diris (raportis la ekonomia ĵurnalo Financial Times, 11 Feb 2004), ke unu el la grandaj bonaĵoj de internaciaj institucioj, kia la Eŭropa Unio, estas, ke ili ebligas ekonomiajn reformojn, kiujn estus malfacile por politikistoj trapreni tra siaj landaj parlamentoj. Mi aŭdis irlandan eksministron konfesi same pri la EU en publika diskuto en 2002. Jen la maldemokratia esenco de la EU por politikistoj, kiuj deziras liberigi la grandegajn privatajn kompaniojn de la rajtoj, gajnitaj de la laboristoj kaj senpotenculoj per demokratia baraktado en periodo, kiam la laborista klaso estis pli forta ol nun. La Unio ebligas ilin preterpasi demokration. La Unio estas iompostioma trafo kontraŭ demokratio.

La Konstitucio enhavas la ekonomian politikon de novliberalismo. Tiu politiko ne plu estus nur politiko, sed parto de la Konstitucio. Tio servas la bezonojn de la grandegaj, translandaj kompanioj kaj malfortigas laboristojn kaj malpotenculojn.

La Konstitucio enhavas la ekonomian politikon de novliberalismo. Tiu politiko ne plu estus nur politiko, sed parto de la Konstitucio. Tio servas la bezonojn de la grandegaj, translandaj kompanioj kaj malfortigas laboristojn kaj malpotenculojn.



intetriĝo de la Eŭropa Komunumo. Tio estas ĉar ĝi, unufoje, donas al la Unio juran personecon kaj apartan ekziston. La Konstitucio faras la Union aparta de, kaj supera ol, ĝiaj membrolandoj. Jure ĝi ŝanĝas la membrolandojn en provincojn.

La tielnomata “Eŭropa Parlamento” ne estas (aŭ estus) parlamento, ĉar ĝi ne rajtas fari leĝojn, altrudi impostojn, aŭ elekti registaron. La ĉefa leĝodona instanco de la EU (krom la malreprezentanta, nerespondeca Komisiono) estas ne la Parlamento, sed la Konsilio de